TELOPEO
Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 01, Januaro 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Jarkunveno de EFNSK

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Sabaton, la 10an de Septembro, 12 membroj de la Federacio partoprenis la jarkunvenon – kvin ĉe Esperanto-Domo, kaj sep per Zoom (inkluzive de Terry Manley el Armidale kaj Rainer Kurz el Germanio). Jonathan komencis la kunvenon per "agnosko de lando".

Post kiam ni aprobis la protokolon de la lasta jarkunveno (la 12an de Septembro 2021), Jonathan voĉlegis la raporton de la prezidanto. Poste, Dmitry voĉlegis resumon de la reporto de la kasisto por la financa jaro 2021–22:

Ĉar la "nova" (de 2017) statuto deklaras, ke iu, kiu estis estrarano dum almenaŭ naŭ jaroj, rajtas esti reelektata nur per speciala rezolucio, okazis voĉdono, ĉu Alan Turvey, Nicole Else, Dmitry Lushnikov kaj Jonathan Cooper estu permesataj esti reelektataj kiel estraranoj. La kunveno unuanime voĉdonis jese.

Ĉiuj anoj de la antaŭa estraro estis reelektataj nekontraŭate. Poste, tiuj estraranoj decidis unuanime, ke la jenaj sep homoj havu la jenajn rolojn:
Prezidanto: Jonathan Cooper
Vic-prezidanto: Andrew Spannenberg
Sekretario: Nicole Else
Kasisto: Alan Turvey
Ordinaraj estraranoj: Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Lushnikov

Fine, ĉiu membro en la kunveno havis la oportunon diskuti la nunan staton kaj estontecon de la Federacio. Terry Manley parolis pri la malantaŭa ateliero kaj galerio, kaj pri gravaj problemoj rilate al la tegmento kaj eniro de akvo dum pluvo. La estraro konsentis, ke ni petu profesian konsilon pri kiel solvi tiujn problemojn.

## Mia Unua Kongreso

*Doris Chen, membro de EFNSK*

Dum la komenco de Januaro ĉi jare, mi partoprenis la kongreson kaj somerkursaron en Melburno, kiu estis kuna evento de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA). Mi eĉ antaŭĝojis ke estis la unua Esperanto-kongreso por mi. Mia ĉefa celo por lerni Esperanto-lingvon estas vojaĝi en la tuta mondo kaj renkonti homojn el diversaj kulturoj kaj landoj. Nun, mi jam komencis fari

vojaĝon per uzado de Esperanto kaj renkontiĝis kun aliaj esperantistoj post la pandemio. Antaŭ longa tempo, mi planis vojaĝi tra la mondo per Esperanto post kiam mi lernis la lingvon. Malbonŝance, la kronviruso okazis kaj haltigis planojn de ĉiuj. Finfine mi povis vojaĝi post 2 aŭ 3 jaroj. Fakte, estis la unua fojo kiam mi flugis ene de Aŭstralio kaj vizitis Melburnon, mi antaŭĝojis!

**Kiel mi trovis la programon**?

Mi pensas ke mi estas tre bonŝanca, ĉar mi komencis lerni Esperanton ĉe Esperanto-Domo en Sidnejo. La organizantoj kaj esperantistoj el Esperanto-Domo estas afablaj, helpemaj kaj subtenemaj. Ili kuraĝigis kaj subtenis min partopreni la kongreson kaj la somerkursaron. Ege dankon al Esperanto Federacio de NSK por financa subteno.

**Kio okazis dum la kongreso?**

La kongreso inkluzivis klasojn de Esperanto, teatron kaj muzikon, ekskursojn, prelegojn pri Esperanto kaj aliaj temoj, ludvesperon, jarkunvenon.

Je la 6a de Jan, mi trovis la lokon kaj mian ĉambron ĉe Internacia Domo. Ankaŭ okazis neformala babilado vespere. Je la 7a, estis matenmanĝo. Poste, okazis malferma ceremonio kaj esperanto-kursoj. Mi elektis la kurson por progresintoj instruita de Giles Thompson. Dum la kurso, ni lernis bazajn vortojn kaj gramatikon. Ni ekzercis nian Esperanton per kutimaj frazoj. Ekzemple, mi nomiĝas… mi ŝatas...; kiom da homoj estas en via familio; kiom vi aĝas, ktp.

Je la 8a de Januaro, mi decidis partopreni la kurson de Katalin KOVÁTS. La kurso estis por spertuloj. La kurso de Katalin estis mirinda! Mi lernis multon, kvankam mi ĉeestis nur unu tagon. Ekzemple, ŝi instruis pri "ankaŭ". Antaŭe, mi pensis ke ordo en la gramatiko de Esperanto estas ne grava. Mi pensis, ke mi rajtas meti "ankaŭ" ien ajn en frazon. Sed ne, la malsama pozicio de "ankaŭ" kreas diversajn signifojn. Do, ne forgesu!

Krome, kafopaŭzo mankis al mi. Dum kafopaŭzo, estas ebleco amikiĝi kun aliaj esperantistoj. Mi kaj du esperantistoj esploris la urbon de Melburno kaj gustumis la vjetnaman vespermanĝon kune.

**Kiom longe mi ĉeestis la programon?**

Bedaŭrinde, nur du tagojn (6-8 Januaro) mi ĉeestis la kongreson. Ĉar mia laboro komenciĝis sekvan lundon, mi ne povis partopreni la tutan programon. Dum la kongreso, mi ĝuis renkonti esperantistojn el aliaj ŝtatoj de Aŭstralio kaj landoj kiel Novzelando kaj Eŭropo. Mi havis eblecon babili kun ili tage kio estis kiel revo por mi.

Espereble, mi povos partopreni en pli da kongresoj estontece!

## Sidneja Lingva Festivalo 2023

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

Je la 11-a de februaro 2023 okazos la 10-a (jubilea) Sidneja Lingva Festivalo. La festivalo okazos en la Ŝtata Biblioteko de NSK (Gallery Room).
Dum la festivalo Jonathan Cooper prelegos pri konstruitaj lingvoj, Richard Delamore - pri Esperanto, Kit Kelen prezentos unu kanton kaj unu poemon en Esperanto.
Pli da informo: www.facebook.com/SydneyLanguageFestival

<u>EFNSW</u>: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

<u>Manlia Esperanta Klubo</u> ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

<u>La Meza Marborda Grupo;</u> 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
<u>Novkastelanoj</u>: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

<u>La Suda Marborda Grupo</u>; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

<u>La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo</u>:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estrarano: | Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov |

